Jar-Raporto de la USONA EKZAMENA SERVO

De la 3-a de julio, 2008, gxis la 1-a de majo, 2009

Haveblas ekzamenoj je tri niveloj: Komencgrada, Duagrada, kaj Supera. Informojn pri la enhavo de ĉiu nivelo oni povas ricevi kontraŭ peto al la administranto. Ĉar la instrukcioj por la administranto kaj la ekzameniĝonto estas en la angla lingvo, la ekzamenoj taŭgas nur por personoj kiuj scipovas la anglan. La kotizo estas $10. Ĉiu kiu sukcesas ricevas oficialan atestilon. Eblas ekzameniĝi ie ajn iam ajn: Apud via hejmo (necesas nur trovi administranton kiu scipovas la anglan, kaj antaŭe sendu al la administranto ties nomon kaj adreson kaj dek dolarojn); ĉe Esperanto-kongreso;aŭ ĉe lernejo kie oni instruas Esperanton.

Cxiuj 6 kiuj ekzameniĝis per la Komencgrada Ekzameno ĉijare lernis Esperanton en la klasoj de Don Houpe ĉe la "North Carolina School for Science and Mathematics". Kvar el la 6 sukcesis kun distingo (Kristen McCarney; Margaret Ronke; Swizz Zolayvar; kaj Katherine Wikrent) kaj 2 malsukcesis. Lastjare ekzamenigxis 7.

Nur 1 ekzameniĝis per la Duagrada Ekzameno (Julie Spickler el Menlo Park CA), kaj sxi sukcesis kun honoro cxe la Esperanto-kongreso en Montrealo. Lastjare 6 ekzamenigxis per la Duagrada.

Unu ekzameniĝis per la Supera Ekzameno ĉijare cxe la Kongreso en Montreal kaj sukcesis (Rick Miller el Muskego WI); lastjare neniu ekzamenigxis per gxi.

Kaj cxijare kaj lastjare ekzameniĝis entute 8, du el kiuj cxe la Kongreso en Montrealo, kaj la ceteraj cxe la "North Carolina School for Science and Mathematics".

Ekzameniĝo eblas ĉe la kongreso de Esperanto-USA en Sankta Luiso ĉijare se oni antaŭanoncas sin.

[La internaciaj ekzamenoj de ILEI-UEA estas tute en Esperanto; haveblas je du niveloj: B2 ("forta meznivela") kaj C1 (pli supera); estas administrataj nur de Esperantistoj kiuj ricevis specialan trejnadon; kaj okazas nur ĉe Esperanto-kongresoj aŭ konferencoj.]

Financa Raporto de Usona Ekzamena Servo

Enspezoj:

Saldo la 3-an de julio 2008:	$427.51
Kotizoj po $10 ricevitaj :	$ 20.00

Bonhavo:.....$447.51

Elspezoj:

Por kaligrafio (po $5) $ 10.00

Poŝto $ 2.52

Tutaj elspezoj $ 12.52

Saldo la 1-an de majo, 2009..... .....$434.99

Historia noto:Ek de septembro 1963, 1,294 personoj ekzamenigxis per la Usona Ekzamena Servo

Doroteo Holland, Administranto

<dorothyjeanh@gmail.com>; (805)967-5241

5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara CA 93111-2521

Sub la aŭspicio de ESPERANTO-USA kaj la

AMERIKA ASOCIO DE INSTRUISTOJ DE ESPERANTO